# KATOLIKA SENTO




3

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO 50a Jaro

N° 9 - Septembro 1971

(Monata bulteno)

# PENSOJ DE LA SANKTA PATRO POR TIUJ, KIUJ NE POVAS ĜUI LIBERTEMPON

Jen aŭgusto. La nuna estas karakteriza momento de la libertempo. Oni interrompas la kutimajn okupojn, la lernejoj estas fermitaj kaj la laboro haltigita, kaj ĉiuj moviĝas por serĉi kontakton kun la naturo, distron kaj ripozon. Tio estas kvazaŭ forkuro el la trudoj kaj el la laciĝo, kiujn la deviga intenseco de la moderna vivo pezigas sur la socio organizita kaj progresinta.

Ni deziras al ĉiuj bona, serena kaj refortiga ĉi tiun paŭzon, kiu ŝajnas tiom natura kaj tiom proksima al la feliĉo. Sed kun du rekomendoj. La unua: ni ne forgesu tiujn, kiuj ne povas ĝui ĉi tiun feliĉan malstreĉon fizikan kaj psikologian: nome, tiujn, kiuj devas resti ĉe la laboro ankaŭ en ĉi tiu periodo, kaj precipe tiujn, kiuj estas ĉe sia posteno de laboro kaj de peno ĝuste por ke la aliaj povu ĝui sian libertempon. Ni ŝuldas almenaŭ penson de respekto kaj de danko al ĉi tiuj prizorgantoj de la aliulaj ferioj. Krome, kiel ne memori pri la suferantoj, la malsanuloj kaj la malriĉuloj en speciala maniero? Ili nun plej multe rimarkas sian malfeliĉan kondiĉon, la malegalecon de sia sorto; ni ne forgesu ilin kaj ni sciu rimarki la ambiguecon de nia mondo, en kiu apud la kreskanta bonstato troviĝas ankoraŭ malbonstato tiel disvastigita kaj des pli sentata ju pli komparata kun la komforto de la aliaj kaj ne malofte ju pli maljusta kaj bezonanta solidaran kaj kristanan helpon. Ĉi tiu homama rememoro ne

malpliigas, sed kreskigas la serenecon de la feliĉa libertempo.

Plie, alia rekomendo: la ĝojo de la feriado ne iluziu nin pri la vera ĝojo, kiu estas ĉiam la ĝojo evangelia, de la vivo streĉita fare de la devoj kaj de la esperoj de iu mondo, kiu ne estas ĉi tie. La koncepto hedonisma kaj ĝuema pri la vivo ne superu tiun veran kaj fortan de nia programo malfacila, ideala kaj bona, tio estas de personoj sin altrudintaj en grandanima kaj kuraĝa misio pri bono. Ni eĉ reakiru spiron por esti validaj al ĉi tiu kvalifiko de vivo gvidata de la kredo kaj de la amo, laŭ la spuroj de Kristo.

I.K.U.E. ĈE LA 56-a UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto en Londono. La 2-an/8, ĉe la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA (kiun partoprenis 500 personoj el pli ol 30 landoj) portis la saluton de IKUE pastro Longoni, dirante, ke ĉiumatene okazas Sankta Meso je la 8-a en la preĝejo de Kristo Reĝo.

La 4-an de aŭgusto, de la 16-a horo ĝis la 17.30, la INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA en sia kunveno, al kiu, sub prezido de p. Longoni, partoprenis 51 personoj el 20 landoj, pritraktis novajn problemojn ekestintajn post la ŝanĝo de la Estraro kaj ekumenaj rilatoj. La raportojn prezentis la nova prezidanto, kaj estraranoj: Mudrak (el Aŭstrujo), Casanoves el Hispanujo kaj Vigar (el Anglujo). Oni raportis, ke la 1-an de aŭgusto okazis solena meso, kiun partoprenis 254 personoj, kaj kuncelebris 8 pastroj, predikis p. Thalmajer.

NIA PREZIDANTO p. Albino Ciccanti anoncis al ni la forpason de sia patro, okazinta la 22-an de julio. Al li, kun niaj kondolencoj, ni promesas la petitajn preĝojn.

..............................................

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO

N° 97

DUM LA 42a ITALA ESPERANTO-KONGRESO en Marina di Grosseto okazos ankaŭ UECI-kunveno, en kiu oni raportos pri la linio de nia Asocio post la nova situacio de IKUE, kaj aparte pri kelkaj problemoj de nia duobla bulteno. Grava kunveno!

LA ABONOJ AL NIA BULTENO por la 1971-a atingis la nombron de 417. Ekde nun, novaj abonoj validos por la tuta jaro 1972. Aliĝu rapide, ni petas!

LA HISPANOJ, KIUJ deziras aboni nian revuon, povas sin turni al nia peranto: P. José Claramunt - Escuelas Pias - CALELLA (Barcelona).

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite, sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

BONFARA KASO: E.Sias:3.500;O.Sias: 2.000; J.Fischer:1.000;A.Signore:1.000;R.Galeotti:2.000; restas:41.825.

KUN VERA PLEZURO kaj danko al la Aŭtoro, s-ano L. M., ni publikas lian lastan poeziaĵon "Somerumo", ĉar inter siaj ne malmultaj plaĉaj kvalitoj, ĝi bone akordiĝas al la temo de la libertempo, pri kiu parolis la papo, laŭ la enkonduka raporto de ĉi tiu numero.

## SOMERUMO

Fuĝinte de l' sufoka varmimpeto
nunjare somerumas mi komforte,
kampare, en gastiga vilaeto,
spiritĝueme kaj fizikosporte:
deklive de altaĵ', arbara tufo
ĉe rava trankvilej' de Monto Ĉufo.

Kaj kiom da beata muta solo
promene inter monto kaj ebeno,
pragimnastiko, streĉo de muskolo,
de l' korpo kaj animo oksigeno.
Ĉirkaŭe, en la plej integra puro,
la viva harmonio de l' naturo.

Situas la kokete ĉarma domo
je kvincent metroj super marnivelo,
en mezo de balzama freŝaromo,
je kanto de pasero kaj kardelo.
Apude, en deĵoro gardostara,
ombrelas altgiganta pin' centjara.

Dominas mia supra belvedero
tre vastan zorge kultivatan valon
je plantoj de olivo kaj vinbero,
kies nektar' honoras la pokalon.
Vagadas plaĉe ĝis sen fin' disperdo
l'okulo, tra l' nuancmagia verdo.

L'etoso milda vekas dolĉajn forojn.
Silentas tempo, la ĉambrar' kvietas,
muzike skandas lante pacajn horojn
olda horloĝo; lude mi versetas.
Lontane, kun kolor-brilad' alterna,
kalejdoskope sorĉas l'Urb' eterna.

Luigi Minnaja

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l'eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

LA PAPA KONSILIO "COR UNUM", dekretita por la kunordigo de ĉiuj iniciatoj de la eklezio helpe al la suferanta mondo, malfermiĝis la 17-an de aŭgusto. Dum sennombra kvanto da aproboj alvenis al la papa decido el ĉiuj mondpartoj, oni reakcentis la intencon de la konsilio respekti en sia laboro la aŭtonomion de la asistaj entoj dediĉitaj al tiu celo.

PAŬLO VI FORLASIS POSTTAGMEZE de la 15-a de julio la Vatikanon por transloĝiĝi en sian someran restadejon de Castelgandolfo, kaj pasigi laŭ kutime la someran periodon, kiu ofte faras el Romo la plej varman urbon en Italujo. Je la 17,40 la aŭto de la papo aperis sub la sonorilarko. Paŭlo VI starante salutis kaj benis ĉirkaŭ du mil fidelulojn italajn kaj eksterlandajn, kunigitajn en la antaŭplaco de Sankta Petro, kaj laŭlonge de la vojo al la latia urbeto plurfoje li malrapidigis la kuron por saluti grupojn da fideluloj. Tuj akceptite de la aŭtoritatoj en Castelgandolfo Paŭlo VI sin montris ĉe la balkono de sia palaco por danki la loĝantaron de Kastelo. "Ankoraŭfoje - li diris - ni pasigos la someran periodon en la paco de la milda atmosfero de Kastelgandolfo: libertempo pli laŭnoma ol reala. Refreŝiĝo jes; ripozo verŝajne. Tiom da aferoj, fakte, en la vivo de la eklezio postulas nian daŭran ĉeeston". Dum tiu periodo ne okazos aŭdiencoj, escepte la ĝenerala merkreda aŭdienco, kaj dimanĉe la alparoladeto, kiun la papo direktos al la ĉeestantoj en la interna korto de la papa palaco, antaŭ la anĝelusa preĝo. Dume la papo, kunigite al siaj ĉefaj kunlaborantoj, preparos la laborojn por la proksima episkopa sinodo,

kiu okazos en oktobro, por pristudi du tre gravajn temojn: La pastran oficon, kaj Justecon en la mondo. La 8-an de aŭgusto li faris al la granda aŭdienco la paroladeton, kiun ni en la unua paĝo redonis en Esperanto.

ALIĜIS AL LA PORMISIA Papa Unuiĝo, la 20-an de julio, 120 kongregacioj, 4.500 religiaj komunoj, 35.000 religiulinoj. La Unuiĝo reprezentas ilon por kunordigi la fortojn por la misiaj problemoj. Al la Unuiĝo aliĝas jam tre multaj sacerdotoj kaj religiuloj; al la sama estis komisiita, ekzemple, la revuo "Mondo e Missione", kiu havas pli ol 30.000 abonantojn. La agado en la Unuiĝo ankaŭ en la virina branĉo komenciĝis jam antaŭ unu jaro, kaj kun notindaj rezultoj. Ĉe la fino de julio kuniĝis en Frascati (Romo) pli ol cent religiulinoj delegitaj de siaj kongregacioj por la misiaj problemoj. Kelkaj temoj estis: la misia vokiĝo; la idealo de la misia fratino; la nova horo de la misioj; misia agado en la religia komuno; kaj, la lernejo, kiel medio de pormisia aktiveco.

PREPARE AL LA SINODA TEMO pri la sacerdota ofico, la Kongregacio por Kredodoktrino, al kiu apartenas pritrakti petojn pri laikigo de sacerdotoj, komisiis al famkonata sociologo kaj juristo, mons. Emilo Colagiovanni, la taskon pristudi, laŭ statistika metodo, la sacerdotecan problemon. Lia esplorado konkludiĝis post du jaroj da studado; kaj ni opinias, ke nia bulteno, kiu donis kelkfoje partajn sciigojn, nun havas oportunecon doni ilin pli komplete kaj precize. Estas konate, ke Johano XXIII, zorgema pri la savo de la animoj, volis redoni iom pli larĝe al eks-sacerdotoj, kiuj ne kapablis daŭrigi sian promeson, liberigon pri la celibata leĝo. Mons. Colagiovanni elstudis ĉiujn dosierojn de jaro 1939 ĝis 1969, kiuj rilatas 8.287 sacerdotojn liberigitajn de celibato, centrante sian aten

ton precipe sur du punktojn: vokiĝo kaj krizo (kun la sekva forlaso). Fakte, rimarkigas mons. C., ĉar ĉi tiuj kazoj estas jam multaj, oni ne devas konsideri ilin kiel izolitajn, sed oni devas sen timo de la vero esplori pri la komunaj motivoj. Pro teknikaj kaŭzoj li devis limigi sian studon al la 31-a de marto 1969. Je tiu dato estis do 8.287 la sacerdotoj regule liberigitaj kaj reduktitaj al la laika stato, kontraŭ 434.541, kiuj en la mondo restis konstantaj. Meznombro do, kiu estas malpli ol du pro cento. Pli alta inter reliĝiuloj (3804 el 145.247=2,6 p.c.) ol inter diocezaj sacerdotoj (4483 el 289.294=1,5 p.c.). Plej alta en Ameriko (2,3 p.c.), sekvata de Eŭropo (1,9 p.c.); inter la nacioj de antikva kristaneco, Nederlando (5,9 p.c.), Hispanujo (2,3 p.c.), Italujo (1,5 p.c.). Per si mem ne ŝajnas tro grava la procento, se oni ne rilatas ĝin al la ĝenerala krizo de vokiĝoj kaj al la samtempa kresko de la katolika popolo. Dum la lastaj 10 jaroj ĉi tiu kreskis je pli ol cent milionoj, dum sacerdotoj malpliiĝis je 14 p.c. Kaj ankaŭ la progreso de la "liberiĝoj" dum la jaroj, estas fonto de zorgoj: 563 ĝis 1963; 559 en '64; 1.189 en '65; 1258 en '66; 1670 en '67; 1906 en '68; 1.142 en la unuaj monatoj de '69. Sed se oni sumigas ankoraŭ tiujn de la aliaj naŭ monatoj de '69 kaj de la '70, ne kalkulitaj de mons. C., la foriĝoj estas entute pli ol 13.000. Tio kreskigas la procenton al 2,9 el ĉ. 435.000 sacerdotoj. Pri la kaŭzoj oni rimarkas, ke ĝis '67 la celibata motivo atingas 75 p.c.; sed post tiu dato aldoniĝas aŭ miksiĝas aliaj. Dum antaŭ '66 nur 4,5 p.c. sin deklaris ne kontentaj pri sia rolo kaj rifuzadis ĝin, ili fariĝis 18,80 p.c. en '67; 26,29 en '68; 39,40 en la unua trimonato de '69. En ĉi tiu lasta sama tempo 85,60 p.c. rifuzis celibaton; 39,40 la aktualan disciplinon; 13,66 montris psikologiajn malekvilibrojn; 12,96 perdon de la kredo. Sed 90 p.c. volus daŭrigi la pastran oficon malgraŭ la ŝanĝita stato. Oni

ne opiniu, rimarkas mons. C., ke ĉi tiu fakto apartenas nur al la katolika eklezio; male, oni devas agnoski, ke ĝi ampleksas la tutan kristanan mondon. Eĉ, unue tiujn konfesiojn, kiuj estas pli bone organizitaj, kaj ĉe kiuj ne ekzistas la celibata leĝo: la ortodoksan, la anglikanan, luteranan, presbiterianan ekleziojn. La statistikoj montris, ke la aĝo de la laikigitaj emas malpliiĝi. En '64 279 sacerdotoj (la duono de la petintoj) atingis 46 jarojn; en '65 ili havis 45 jarojn; en '66, 43; en '67 40; en la du lastaj tempoj mezuritaj, malpli ol 38. Nur tre malmultaj deklaras, ke ili neniam sin sentis vokitaj. Fine, oni reliefigas, ke 20 p.c. estis parokestroj; 45 laboris en paroko; 15 p.c. instruadis aŭ flegis malsanulojn; 9 p.c. laboris en misilandoj. Kompreneble, la statistikoj donas ankaŭ multajn interesajn indikojn; ankaŭ klarigas kelkfoje ilin; sed la rezoluciojn, kvankam kelkfoje sufiĉe klare travideblajn, ili lasas al la laboroj de la Sinodo, kiu pritraktos baldaŭ la temon tiel esencan por la eklezio.

"KREDO KAJ STRUKTURO de l'eklezio" (la doktrina komisiono de la Tutmonda eklezia konsilio) havis post tri jaroj sian ĝeneralan kunvenon en Loveno - Belgujo - . Temo de la intensa semajna laboro (2-10/8) estis: Unueco de la eklezio kaj unueco de la homaro". Kvankam jam de tri jaroj estis akceptitaj en la Konsilio la katolikaj teologoj, ĉi tiu tamen estis ilia unua partopreno. La direktoro mem de la komisiono, Lukas Vischer, akcentis la "apartan gravecon por la ekumenaj klopodoj, kiun kunportis la akcepto de la katolikaj teologoj, kiel plenrajtaj membroj". La altnivela kunveno estis malfermita de kard. Suenens, kiu invitis la kunlaborantojn priserĉi ĉiujn vojojn por harmoniigi la necesan unuecon kun la legitima plurismo. Viciĝis multaj parolantoj por pritrakti diversajn aspektojn de la temo: Unueco de eklezio rila-

te al la luktado por pli bona socio; al dialogo kun la aliaj religioj; al rasismo; al la forpuŝitoj de la socio; al kulturo kaj instruado ĉe la diversaj popoloj kaj klasoj. Kvin subkomitatoj dividis inter si la laborojn, por doni siajn raportojn en la kunvenoj. Unu el la proponoj, faritaj jam antaŭ dek jaroj kaj poste en la ĝeneralaj asembleoj de Upsala kaj de Addis Abeba, ke oni klopodu por universala koncilo, estis pridiskutita ankaŭ en Loveno. Hodiaŭ tamen tiu idealo aperis ankoraŭ ne matura. Tro multaj estas ĝis nun la resanigendaj diverĝoj inter la kristanaj eklezioj. Tamen en Loveno, kiu iam estis centro de la luterana kontraŭreformo, je la unua fojo oni faris kelkajn paŝojn renkonte al la eŭkaristio, celo de unuiĝo kaj okazo de disiĝo. Kuncelebris solenan meson je la 8-a de aŭgusto kard. Suenens kun dudeko da pastroj. Ne nur ĉeestis ĉiuj reprezentantoj de la protestantaj eklezioj, sed eĉ ili plenĥore kantis "Kyrie", "Credo", "Sanctus". Nur ĉe la komunio reaperis la malĝoja disiĝo: dum la katolikoj ricevis la sakramenton de la reala ĉeesto de Jesuo, la protestantoj prenis pecetojn de la ĉiutaga pano el kestetoj, simbolo de atendo de tiu tago "en kiu ĉiuj kristanoj kuniĝos en frakcio de la eŭkaristia pano". La Lovena kunveno kvankam montris el lojalaj diskutoj la gravajn kontrastojn ankoraŭ ekzistantajn pri la kredo kaj strukturo de la eklezio, tamen alproksimigis multajn aliajn vidpunktojn, kaj indikis la direkton de la novaj studoj, kiujn oni devas ankoraŭ profundigi por forigi ĉiujn obstaklojn al unuiĝo. Certe restos en la memoro de multaj la vortoj de la hinda jezuito Rayan, pri la rilatoj inter unueco kaj plurismo: "Rigardu, li diris, la ekzemplon de la katolika eklezio. Ĝi estas eklezio, kiu akceptas diversajn spiritajn vivmanierojn, diversajn liturgiojn, diversajn teologiojn, diversajn strukturojn. Tamen ĝi konservis sian propran unuecon. Ĉu do ne povus esti ĉi tio pristudinda ekzemplo kaj normo? Kaj, ĉu oni ne po

vus plilarĝigi ĝin por ampleksi ĉiujn kristanajn eklezioj n?"

REPREZENTANTO DE ROGER SCHUTZ, prioro de la religia protestanta komuno de Taizé, konata pro sia notinda kontribuaĵo favore al la ekumena movado, estos sendita al la Sankta Seĝo. La decido estis konfirmita al kard. Willebrands, prezidanto de la sekretariato por la unueco de la kristanoj, dum lia tritaga vizito, farita en julio al la komuno de Taizé.

LA PUBLIKADO DE LA GERMANA eldono de "L'Osservatore Romano" komenciĝos jam en septembro, tuj antaŭ la laboroj de la Sinodo. Prirespondanto de la publikaĵo estas jezuito Karl Heinz Hoffmann. La nova eldonaĵo estos disvastigita en Germanujo, Aŭstrujo, Svislando. Kun la germana, "L'Osservatore Romano" atingas ses eldonojn, ĉar de longe ĝi aperas en la itala, franca, angla, hispana kaj portugala.

MALGRANDA ANGLIKANA PILGRIMADO, 25 personoj, je la unua fojo vizitis, la 26-an de julio, la tombon de la apostolo Jakobo kaj la bazilikon al li dediĉitan. La pilgrimado estis gvidata de la anglikana kanoniko Baron, membro de la Konsilio de la Anglaj eklezioj, kiu efektivigis persone diversajn vojaĝojn al Hispanujo, partoprenante en multenombraj ekumenaj renkontiĝoj. En la kapelo de la granda seminario anglikana la kanoniko celebris liturgian oficon laŭ la intencoj de la pilgrimantoj: la kapelo estis pruntedonita tiucele de kard. Quiroga y Palacios, ĉefepiskopo de Sankta Jakobo de Kompostelo.

LA DIA VORTO, FUNDAMENTO kaj kriterio de la kristana vivo, ebligo de dialogo kaj forto de unueco, estis la temo de la Naŭa Semajno por Ekumenisma enprofundigo (31-a de julio, 8-a de aŭgusto). Ĝin organizis en

Napolo SAE (Sekretariato Agadoj Ekumenaj) kaj partoprenis en ĝi pli ol ducent personoj. En la kunveno, mal fermita per mesaĝo de kard. Willebrands, kiu indikis en la dia vorto la bazon por unueco de ĉiuj kredantoj, dum la unuaj tagoj parolis kvalifikitaj reprezentantoj de diversaj kristanaj konfesioj: evangeliaj, ortodoksaj, kaj ankaŭ hebreaj kaj musulmanaj, alterne kun katolikaj pre legantoj. "Ĝis kiam - diris nostalgie la baptista pastoro Williams, kaj per similaj esprimoj ankaŭ aliaj - ni, kiuj nutriĝas per la sama dia vorto, ne povos ankaŭ kune nu tri nin?" Sed li memorigis: "La dia vorto estas ja forto kaj bazo de unueco, sed estas ankaŭ glavo ambaŭtranĉa, kiu disigas, kiam anstataŭ atenti la diajn verojn, la homo celas, konscie aŭ ne, per ĝi defendon de sia vidpunkto". La postaj tagoj estis entute dediĉitaj al laboroj de komisionoj, kio per si mem estas signo de la ekstrema diligenteco kaj profundeco de la studoj pri la temo sub ĝiaj teologiaj kaj praktikaj aspektoj. Oni ne konsideris fremdaj al la ĝenerala temo la dolorigajn motivojn de disiĝo inter kristanoj: miksreligiaj edziĝoj; interkomunio; ekumena itala traduko de la biblio, ktp. Oni debatis pasie la malfacile argumentojn, kaj oni proponis varmajn petojn al la eklezaj aŭtoritatoj por daŭrigi la kontaktojn inter la kontraŭstarantaj partoj, cele al la plej eble rapida unuiĝo.

PILGRIMADO DE 270 MALSANAJ sacerdotoj al Lurdo, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, montris, kiel la plej granda nombro da sacerdotoj sanaj kaj malsanaj, junaj kaj maljunaj, laŭvivas fervore sian vokiĝon, spite de la kampanjo de tiom da ĵurnaloj kaj filmoj, kiuj konas nur la makulojn de la ekleziuloj, kvazaŭ la eklezio estas reprezentita nur de la falintoj. La evento, salutita de papa mesaĝo, intencis celebri la 25-an datrevenon de la fondo de Centro "Sufer-volontuloj", kaj la 20-an de la pilgrimadoj de malsanaj sacerdotoj al la groto de Masa-

bielle. Vere kortuŝaj, antaŭ la tero kaj la ĉielo, la kun celebroj faritaj de la 270 brankarditaj sacerdotoj, kune kun la aliaj, preskaŭ sescent, inter kiuj diversaj episkopoj.

POST LA NOKTA ENVAGONIGO en Ĝenovo de multaj malsanuloj pilgrimantaj al Lurdo el diversaj italaj regionoj, la 30-an de julio, kiam la trajno (alia ol tiu de la malsanaj sacerdotoj) jam rapide kurante eniris mallarĝan kaj longan tunelon, abrupte leviĝis orelŝiranta alarmfajfado, kaj la trajno tuj blokiĝis. Voĉo fulme trakuris la trajnon: Vagono brulas! Fakte altaj flamoj jam eliĝis kun densega fumo el la fenestroj de la antaŭlasta vagono, plenplena de brankarditaj malsanuloj. La situacio fariĝis konsterna. La vento de la galerio impetis furioze sur la flamojn, kun bruego simila al sireno. Oni decidis malkroĉigi la du lastajn vagonojn, kiuj apenaŭ eniris en la tunelon, kaj tuj daŭrigi la kuron de la antaŭa parto de la trajno, ĉar la fumo minacis sufoki ĉiujn, kvankam estis ankaŭ timo, ke la fajro, rompante la elektran draton bloku la trajnon meze de la mortiga galerio! Tiel, dum la lokomotivo kun la unuaj vagonoj sin savis kiel eble plej rapide, atingante la posttunelan stacidomon Finalpia, en la du brulantaj vagonoj oni jam komencis elvagonigon de la malsanuloj. Intertempe el ĉiuj proksimaj urboj alkuris antaŭ duonhoro, kun obseda sirenululado, 40 aŭtoambulancoj, fajrogardistoj, policistoj kaj ĵurnalistoj. Kiam ĉi tiuj lastaj alvenis, vidante tiom da brankardoj, tuj senkontrole dissendis konsternajn apokalipsajn informojn de multaj vunditaj kaj mortintaj pilgrimantoj en la infera fajrego. Sed kiam, je la dua horo dumnokte oni kontrole vokis la nomojn de la cent personoj inter enlitiĝintoj kaj flegistaro de la du vagonoj, respondoj regule alvenis. Nur ok el ili mankis! Sed jen reĝustiĝo de ĉi tiu konsterna kontrolo: ĝu

ste ok malsanuloj estis transportitaj al hospitaloj por la unuaj urĝaj helpoj. Sed, ĉar la tieaj kuracistoj eĉ ne vundon aŭ ian ajn danĝeron rimarkis, ili estis tuj resenditaj kaj jam estis denove survoje por rekuniĝi al sia grupo. Kaj neniu el la cent vojaĝantoj suferis la plej etan danĝeron! Oni perdis ja lambastonojn, ortopediajn aparatojn, valizojn, sed eĉ ne unu suferis en la persono. Iu kripligita malsanulino rakontis: Mi iumomente konsciiĝis, ke kun nur unu kruro, sen lambastonoj, sen ŝuo, mi estis transportinta for de la trajno alian paralizitan malsanulinon, saltante tra la ŝtonoj! Kelkaj aliaj en la mallumo stumblis kaj rulfalis unu sur la alian laŭ la eskarpo flanke de la reloj; aliaj ankoraŭ trafenestriĝis, aliaj falis descendante el la altaj ŝtupoj de la trajno; sed neniu ricevis la plej etan danĝeron el la faloj, el fajro, aŭ pro la varmego de la vagonoj entute brulantaj kaj fumplenaj. Eksterordinara estis la trankvilo kaj la fido de ĉiuj, kiuj, tuj kiam sin savis, kuniĝis preĝe kun la aliaj por la savo de tiuj, kiuj ankoraŭ mankis. La staciestro de Finalpia deklaris, ke la trajno haltis en la ĝusta momento: se ĝi estus progresinta ankoraŭ du sekundojn, t.e. 50 metrojn, preskaŭ ĉiuj estus sufokitaj en la galerio aŭ forbruligitaj. Kaj li aldonis: Se tiu estus estinta trajno da turistoj, anstataŭ da pilgrimantoj, mi ne scias, ĉu iu estus sin savinta! Multaj konfesis, ke estas ne kompreneble, kiel la malsanuloj povis elvagoniĝi, dum la flamoj invadis furioze la du vagonojn pro eksplodo de kunpremita gasbotelo. Fervojistoj, policistoj, kuracistoj, ĉiuj plenakorde agnoskis ke, sen mirakla interveno de la Sinjorino de Lurdo, oni ne povas ekspliki, kiel eĉ ne unu vundita persono troviĝis post la terura okazintaĵo. La vagonaro plena de preĝado kaj pentofaro, ĝuste kiel la ĉie la Patrino postulis de la malgranda Bernadetta, reprenis sian vojaĝon kun prokrasto de kvin horoj, sed kun ĉiuj siaj 600 pilgrimantoj. Certe, dum spirite la tuta eklezio.

ĉeestis preĝe en tiu pilgrimo, ankaŭ la ĉiela eklezio partoprenis en ĝi, kun la mirakla interveno de Maria, patrino de l'eklezio.

LA AGADKALENDARO DE "MANI TESE" (etenditaj manoj), la itala kristana porevolua organizo, fariĝas pli kaj pli riĉa. Okaze de la internacia marŝado, kiu celis Romon je la 9-a de majo, oni kolektis 150 milionojn da liroj. Laŭ la jam programitaj helpoj, 4.000 litkovriloj estis senditaj en la regiono de Assam en Hindujo por la rifuĝintaj bengaloj; kaj 10 milionoj da liroj por la rifugintaj Pakistanoj. 2.500 junuloj partoprenos diversloke en la 30 kunvenoj por studo kaj laboro en la tria mondo; rimarkinda grupo da junuloj de "Mani Tese" troviĝas en Parizo por perfektiga kurso cele al studado de problemoj soci-ekonomiaj pri evoluo. Alia grupo sin preparas en Milano por renkontiĝi en Ĝenevo kun fakuloj de la diversaj organizoj de UNO.

KARD. FRANCISKO SEPER, jam ĉefepiskopo de la kroata ĉefurbo Zagrebo, kaj nun prefekto de la Kongregacio por Kredo-doktrino, estis elektita de la papo kiel legato por la sesa internacia Mariologia kongreso (12 - 14 de aŭg.) kaj por la dek tria kongreso pri Maria (15-a de aŭg.) en la nacia sanktejo Marija Bistrica. La du iniciatoj celis fekundan progreson en la studoj rilatantaj Marian en la historia kaj teologia tereno kaj en la devoteco al nia ĉiela Patrino. Fakte la kulto al Maria, kiel oni demonstris dum la antaŭa Maria kongreso de Lisbono en la 1967-a per la dia vorto mem el la sanktaj Skriboj, ne estas disigita de la kulto al Kristo, ĉar ambaŭ celebras la savon, kiun la enkarniĝo de Kristo ebligis. Partoprenis kun 120 katolikaj teologoj el 23 landoj, ankaŭ 10 teologoj ortodoksaj, anglikanaj, kalvinistaj kaj metodistaj. Rimarkindaj la paroladoj de mons. Tomislav Jablanovic, pri la rilatoj de la kulto al Maria kun la his-

lama kredo; de arkeologo Nenad Cambi pri la Maria kulto en Salona kaj Split; de p. Laurentin kaj Balic Schmaus kaj Mascal. Sed aparte impresaj kaj memorindaj estis la parolado de kard. Suenens, daŭra prezidanto de la Mariaj kongresoj, kaj la homilio de kard. Seper, legato de la papo. Li deklaris, ke tute ne estas necesaj novaj dogmoj, sed profundan eniĝon en la kristanan vivon de la devoteco al Maria. Ĉi tio, kio estis gloro de la religia sento ĉe la slavaj popoloj dum jarcentoj, devas pli kaj pli firmiĝi kaj kreski. La 8-an de aŭgusto la kongresanoj inaŭguris novan preĝejon en Zagrebo, dediĉitan al Nia Sinjorino de la Rozario; kaj fine, la 15-an, festo de la ĉielenpreno de Maria, okazis la apoteoza konkludo de la Maria kongreso en la sanktejo Marija Bistrica. Kulminaj emocioj estis, krom la mesaĝo de Paŭlo VI, legita dum la homilio de la legato, kard. Seper, ankaŭ la varma saluto de la papo mem, kiu, sin adresante antaŭ la anĝelusa preĝo al la fideluloj kunvenintaj en Castelgandolfo, volis aŭdigi per la radio siajn benajn vortojn ankaŭ al la kongresanoj en la jugoslava sanktejo. Ni opinias, ke multaj niaj legantoj, ne nur jugoslavoj, plezure legos la tradukon de la integra papa parolado:

## LA MISIO DE LA MADONO EN LA PLANO PRI LA SAVO

Hodiaŭ ni salutas vin ĉiujn ĉeestantojn, kaj tiujn, kiuj aŭskultas nian voĉon en la nomo de Maria ĉielenprenita en la integreco de sia esto, animo kaj korpo, kunigita kun sia Filo Jesuo Kristo, nia Redemptoro, en la pleneco de tiu vivo eterna, kiun ankaŭ ni ĉiuj kredantoj kaj savitaj per dia mizerikordo esperas iam reale partopreni.

Fratoj kaj Filoj, hodiaŭ estas tago de festo por la Madono Sanktega, festo, kiu kronas ĉiujn festojn, kiujn nia kulto, nia devoteco al Maria tributas al la Patrino de Dio kaj al nia ĉiela Patrino. Festo de gloro por ŝi, festo de ĝojo, festo de espero por ni.

Ni scias, ke ĉi tiu sama mistero estas nun celebrata, kun speciala soleno kaj kun intensa sento religia, ĉe la sanktejo de Marija Bistrica apud Zagrebo, en la koro de Kroatujo, en Jugoslavio, kun granda alfluo de fideluloj, venintaj el diversaj lokoj de Eŭropo kaj de la mondo, kaj precipe de la bona popolo de tiu regiono, ki el konkludo de du kongresoj internaciaj, havantaj kiel temon la Madonon; unu Mariologia, okazinta antaŭ kel kaj tagoj en Zagrebo, pri studoj historiaj kaj teologiaj rilate al la kulto al Maria en la eklezio latina kaj en ti uj Orientaj ekde la 6-a ĝis la 11-a jarcento; la alia pri Maria, celebrita ĉe la sama sanktejo laŭ la temo: "Maria kaj la moderna mondo". Kaj ĉi tiu estas ago de omaĝo al la Madono, kaj ago de pripenso por ni, por la homoj de nia tempo: ĉu ni povas honori la Virgulinon kun la sama purega kaj fervora devoteco tradicia, kun la sama persvado esprimi en ĝi la veran religion de la sincera kredo kristana?

La respondo estas jesa, Fratoj kaj Filoj tre karaj: ni ne devas malpliigi nian pietaton al la Virgulino Maria, ni modernaj, pli ol iam postulemaj pri evangelia aŭtentikeco, aŭ serĉantaj la misterajn vojojn al la dia transcendo. Ni devas resti fidelaj kaj fervoraj en la kulto, en la amo, en la imitado, en la alvoko al la tre sankta Maria. La ĝusta devoteco al la Madono estas signo de la ĝusta interpretado pri la kristana religio; pri nia religio katolika precipe. Tion ripetas al ni, kun ama kaj kora klareco, la Koncilo.

Ĉio konsistas en la kompreno pri la plano de la revelacio, kiu malfermis al ni "la misteron kaŝitan al la jarcentoj .... kiu estas Kristo" (Kol.1,26); plano dia pri savo por la tuta homaro, por la tuta historio, plano kiu metiĝis kun nedirebla elekto, kun senfina amo, sur Virinon privilegiitan, la gracoplenan, la benitan, oferante al ŝia humila kaj libera akcepto, al ŝia homa koo

perado, la plenumon de la ago decida kaj nedirebla, sed vera, sed reala, de la enkarniĝo de la Vorto de Dio. Maria estas la fonto, Maria estas la Patrino, kiu enkondukas Kriston en la mondon. Ŝi estas en la centro, ŝi estas ĉe la pinto de la sortoj de la homaro. Estas ŝi, kiu, pere de la Sankta Spirito, igas Kriston nia frato. Ŝi estas la "ancilla Domini", la unua kunlaborantino de nia savo pere de la okazaĵo plej homa, plej nia, kiu permesas al ni alproksimiĝi al ŝi kun sento de homa parenceco, la nasko, la patrineco: Patrino de la korpo de Kristo en la karno, Patrino, per solidaro homa kaj spirita, de la Korpo mistika de Kristo, kiu estas ni, la eklezio.

Se ni, modernuloj, sopiras determini la ekonomion de la savo ~~de la savo,~~ se ni laboras, verŝajne senkonscie, por la unueco, la frateco, la paco, la savo de la homaro, ni ne povas ne rekoni la pozicion kaj la mision de Maria: ŝi estas la pordo, tra kiu la Savanto Jesuo eniras en la mondon; ŝi estas la "Janua coeli", la pordo de la ĉielo, la "kaŭzo de nia ĝojo". Ni himnu al Maria, por ke ni estu malpli nedignaj, malpli nekapablaj akcepti Kriston kun la himno de la kredo, de la espero, de la amo, kiu, sola kaj en plej alta grado, estas al li ŝuldata.

Kia profundeco de diaj veroj! Kia fonto de konsola konfido!

Ni, do, estu sub la signo, sub la mantelo de Maria por esti sub la elverŝo de la savo de Kristo. Tion ni petegas hodiaŭ por vi, por la kongresanoj de Marija Bistrica, por la tuta eklezio kaj por la tuta mondo per nia Apostola Beno.

KONKLUDIĜIS, LA 17-an de julio, en la sidejo de "Eŭropa Centro" en Luksemburgo, la naŭa kongreso de la Katolika Unuiĝo por la Internacia Informado, dediĉita al la publika opinio en la eklezio. La 250 kongresanoj, venintaj el 60 landoj, pridiskutis dum tri tagoj unu el la plej

gravaj problemoj por la eklezio, la publika opinio, kies funkciado - kiel asertis Paŭlo VI en sia mesaĝo al la kongreso - estas nepre necesa al la vivo de la eklezio mem. En tiu kongreso oni aŭskultis tri ĉefajn raportojn. La unua estis farita de d.ro Konrad Kraemer, direktoro de la germana katolika agentejo, pri: "La gazetaro, gvidilo de la publika opinio en la eklezio". Pri la rolo en la publika opinio fare de katolikoj laborantaj en la laikaj periodaĵoj, raportis Josè Luis Martin-Deschalzo, hispana verkisto kaj ĵurnalisto. La tria oficiala oratoro estis George Hourdin, direktoro de "Vie Catholique", pariza semajna revuo, larĝe disvastigita. Li parolis pri "la katolika gazetaro, kiel amplifilo de la publika opinio en la eklezio".

PATRO MAKSIMILIANO KOLBE estos verŝajne beatigita la 17-an de oktobro en la baziliko Sankta Petro en Romo. La informo estis donita la 11-an de julio de p. Basilius Heiser, ĝenerala superulo de la franciskana ordeno en Wuerzburg. Patro Kolbe, devena el Aŭstrujo, post la fino de la Aŭstria-Hungara imperio petis la polan naciecon. La 14-an de aŭgusto li oferis sian vivon por savi tiun de alia malliberigito, patro de kvin infanoj, en la nazisma koncentrejo de Auschwitz.

DUM LA FESTO DE LA KORPO de Kristo okazis en Varsovio la kutima solena procesio honore al la tre sankta Sakramento. En tiu evento montriĝis la fundamenta religiemo de la loĝantaro: la tuta centro de la metropolo estis blokita pri ĉiu alia trafiko dum kelkaj horoj. La primato de Pollando, kard. Wyszinski kondamnis la premojn faritajn kontraŭ la kredantaro por malkuraĝigi la kristanan vivon, kaj deklaris, ke la pola popolo estas firme kunigita per sia kredo, kaj ke oni devas agnoski ĝiajn religiajn rajtojn. Ankaŭ en multaj aliaj urboj ripetiĝis la kutimaj solenaj publikaj manifestacioj honore

al la dia Eŭkaristio.

NENIU VOJAĜO DE LA PAPO al Pollando estas ĉimomente en programo. La direktoro de la preskonferenco de la Sankta Seĝo, prof. Alessandrini, pridemandite, okaze de novaj onidiroj rilate al iu proksima vojaĝo de la papo al Pollando, rebatis la malkonfirmojn jam antaŭe deklaritajn. Estas konate, ke Paŭlo VI antaŭ kvin jaroj esprimis publike sian deziron viziti la Marian sanktejon de Czestochowa, sed vane, ĉar la tiamaj polaj aŭtoritatoj ne konsentis al li la permeson.

RESPONDE AL LA LETERO de Paŭlo VI, adresita al patriarko Atenagoro, la 8-an de februaro, okaze de la mesaĝo transdonita pere de metropolito Melitone dum lia vizito al la papo, la patriarko de Konstantinopolo denove esprimis per letero, publikita en L'Osservatore Romano, sian ardan deziron plumarŝi laŭ la vojo al unuiĝo de la du eklezioj. Kard. Willebrands prezentante la dokumenton de patriarko Atenagoro, adresitan al la "pli granda Frato", substrekas la sincerajn esprimojn de la patriarko. Menciante la doloran plurjarcentan rompon, patriarko Atenagoro memorigas, ke la Orienta kaj Okcidenta eklezioj neniam disiĝis inter si pri la mistero de Jesuo enkarniĝinta, pri la dia kaj homa eklezio kaj pri la esenco de la komunio. Same neniam oni reciproke malagnoskis validecon de sakramentoj, precipe de eŭkaristio, kaj la laŭapostolan sacerdotecon, kio diferencigas la rilatojn de ĉi tiuj "frataj eklezioj" disde la protestantaj. Sed por forigi tro suprajâjn opiniojn, kard. Willebrands ankaŭ memorigas la deklarojn de la ekumena ortodoksa episkoparo post la citita papa letero: "La partopreno en la komuna kaliko... estas la lasta celo, samtempe facila kaj malfacila. La patriarko opinias tion facila, ĉefe post la papa letero. Sed ĉi tio - ili asertas - ne estas persona afero, kiel la renkontiĝo de la papo kun la patriarko,

la 5-an de januaro 1964 en Jerusalemo, nek afero inter la Roma kaj la Konstantinopola eklezioj, kiel estis la forstreko de ekskomunikoj la 7-an de decembro 1965-a. Necesas glatigi la vojon ambaŭflanke, atente primezuri la lokajn situaciojn kaj la eventualajn sekvojn, kaj aparte oni devas interakordigi la diversajn ortodoksajn ekleziojn, dum en Okcidento la papo devos ricevi konsenton de la ĉirkaŭanta episkoparo. Kiel, kaj kiam ĉi tio okazos? - demandas la citita dokumento -. Jen la granda problemo, kiu hodiaŭ estiĝas post la letero de Paŭlo VI. Tio okazos, kiam la Sinjoro volos, kiam la prirespondantoj akceptos kaj plenumos tion. Tiu estos vere la granda tago de la Sinjoro". La vortoj de la papo kaj de la patriarko, diras kard. Willebrands, estas konkordaj en la agnosko, ke inter la du "frataj" eklezioj ekzistas jam preskaŭ tuteca komunio, tamen ankoraŭ ne perfekta. La dialogo celos forigi konstraŭstarojn. Sed oni ne devas oponi dialogon pri teologio al tiu de amo. Metropolito Melitone feliĉe diris: "Amante nin reciproke kaj dialogante en la amo ni faras teologion, aŭ pli ĝuste, ni teologie konstruas. Tio permesas konstati, ke ni jam eniris en la teologian dialogon".

LA SANKTEJO DEDIĈITA AL MARIA ĉe Trebisondo, en Turkujo, estas ĉiudimanĉe vizitata, krom de la katolikoj, ankaŭ de granda nombro da musulmanoj. Du horojn antaŭ la meso, jam en la antaŭanta placo svarmas homamaso, atendante kun pacienco, ke la katolika pastro malfermu la pordojn. La musulmanoj estas konvinkitaj, ke post la moskeo, nur la kristana preĝejo kapablas liberigi la homan korpon de malsanoj, la " diablaj persekutadoj". Por eniri en la preĝejon la musulmanaj viroj kaj virinoj senŝuiĝas; sed la viroj demetas ankaŭ ĉapojn kaj ĉapelojn, kaj sidante sur tapiŝoj, kantas religiajn himnojn. Ĉe la fino de la meso ĉiuj kune recitas

la "Patro-nian" en la turka lingvo. Verŝajne en ĉio ĉi ti o kune kun kredo estas ankaŭ ia superstiĉo. Estas tamen kortuŝa spektaklo vidi, kiel de la Patrino de Dio tiom da malriĉuloj kaj suferantoj esperas konsolon kaj helpon.

PAŬLO VI RICEVIS EN KASTELGANDOLFO la novan ambasadoron de Irako, generalo Hassan Mustafa al Nakib por la prezento de la akreditiloj. En la salutvortoj al la diplomato, la papo volis memorigi, ke la aktualaj landlimoj de la iraka nacio entenas ankaŭ la naskiĝlandon de Abrahamo,"la respektinda patriarko de tri religioj", t.e. de kristanismo, de hislamismo kaj de hebraismo. La papo esprimis poste deziron, ke la katolika eklezio ĉiam ĝuu la necesan liberecon por plenumi en Irako, "kie ĝi ne estas fremda" sian savan taskon kaj por doni siajn servojn en la asista kaj en la edukiĝa kampoj.

AL LA UNUA RENKONTIĜO Tutafrika-Malagasa de la laikoj, kiun partoprenis tricent delegitoj ĉe Akrao en Ganao, la papo sendis mesaĝon, kie interalie li deklaras:"Vi havas respondecon pri la kresko de l'eklezio, ĉar vi estas membroj de la dia popolo; kaj vi havas respondecon ankaŭ pri la progreso de Afriko, ĉar vi estas membroj de la surtera civito. Ĉi tiu duobla respondeco devas esti ununura tasko por kristanoj, kiuj forĵetas disiĝon inter vivo kaj kredo, kaj klopodas kunlabori por la tempa kaj surtera progreso de la homaro, ne malpli ol por ĝia eterna destino, laŭ harmonia unueco de idealo kaj vivo. Vi - aldonis la papo - atingos vian celon, donante al via apostolado afrikigitan formon. Pro tio tamen vi ne hezitu elpreni de la ekleziaj spertoj ĉion, kio havas universalan valoron kaj respeguligas la grandajn misiajn instruojn de la malnova kaj nova Testamentoj.

LA INTERNACIA KOMISIONO por la Katolika Instruado kunvenis ĉijare por la oka ĝenerala asembleo en Kinŝa-

so, Konga ĉefurbo. La temo: "Partopreno de la lerneja edukiĝa katolika komuno en la progreso" artikiĝis laŭ tri subtemoj: lerneja edukiĝa komuno; partopreno de la lernejo al evoluo; specifa kontribuaĵo de la katolika instruado al progreso. Celo de la simpozio estas fiksi direktivojn laŭ tutmonda skalo en la sfero de la katolika instruado. Partoprenas en la asembleo reprezentantoj de ĉirkaŭ tridek ŝtatoj, inter kiuj dek sep Afrikaj. La laboroj startis kun la bondeziraj vortoj de kard. Villot, Ŝtata Sekretario, en nome de la papo.

MONS. THIANDOUN SKRIBIS paŝtistan leteron al sia diocezo, klarigante la celojn kaj la avantaĵojn de la celebrota Roma Sinodo. Ĝi, diras la ĉefepiskopo, estas grava evento, ĉar ĝi estas organizita kiel asembleo de reprezentantoj de la tuta eklezio, kun celo varbi ĉiujn vivajn fortojn por la niatempa homliberigo kaj progreso. Ĝi ankaŭ donos gravan helpon al la papo, ĉar estigos unuigon kaj kunlaboron inter li kaj la episkopoj de la tuta mondo; donos senperajn informojn pri la interna vivo de la eklezio, ĝiaj problemoj kaj iliaj solvoj; donos eblecon de unueco pri iniciatoj. Pri la celoj, kiuj estas: paŝtista sacerdoteco, kaj justeco en la mondo, la episkopo rimarkis, ke la dua asembleo de la Afrikaj konferencoj, okazinta ĉe Abidjan, fine de la pasintjara aŭgusto, jam alvokis ĉiujn sacerdotojn kaj katekistojn al pristudo de tiuj temoj.

POR LABORKAMPO AL KONGWA kaj Mbuga interne de Tanzanio, ekvojaĝis el Florenco 18 junuloj la 28-an de julio. En Kongwa ili konstruos bublernejon- orfejon por malriĉaj infanoj, kaj en Mbuga kuracejon. La laborkampo estas organizita de la asocio "Misihelpantaj laikoj", kiu de multaj jaroj aktivas en Florenco. Temas pri asocio de laikoj, kiuj sin devigas batali kontraŭ malsato, malsanoj, mizero de la tria mondo. La ju

nuloj, kiuj partoprenas en la kampo, apartenas al diver saj junularaj grupoj dependantaj de la sama asocio. Ĉiu grupo elektis reprezentanton por vojaĝo al Afriko, pagante la vojaĝon pere de kolekto de papero, libroj, ktp.

OKAZE DE LA SOMERA LIBERTEMPO ses membroj de la Federacio de Katolikaj Medicinaj Studentoj, iniciatis en la diocezo de Warangal (Hindujo), sub gvidado de kuracisto, interesan eksperimenton. Elektinte vilaĝon, kaj provizinte pri notinda granda kvanto da medikamentoj, la porsaniga ekipo vizitis la malsanulojn de la vilaĝo, flegante surloke la malpligravajn kaj zorgante pri la transporto al la urbo de tiuj, kiuj bezonis hospitalajn kuracadojn. Admirite pro ĉi tiu servo entute senpaga, ankaŭ aliaj kuracistoj hinduaj kaj musulmanaj kuniĝis en la iniciato, altirante en ĉi tiu helpo ankaŭ direktorojn de apotekoj-spicvendejoj, kiuj nun disdonas senpage kuracilojn malfacile akireblajn, omaĝe al la kuracistoj.

EN LA SUDA KOREO je la unua fojo post multaj jaroj la kresko de la katolikoj estis malpli ol dek mil unuoj. Kutime ĉi tiu limpunkto estis antaŭe notinde superita. Dum la jaro 1970 male, la pliigo absoluta estis de 9741 baptitoj. La indiko estis donita de statistiko enkondukita de la episkopa Korea konferenco. La kaŭzoj estas kompleksaj. Fakte la totalo de la baptoj superis 50.000 unuojn. La nombro de la adultoj baptitaj estas iom malpli alta en komparo al la sama de la antaŭa jaro; tamen ĝi atingis 30 mil unuojn. La nombro de la infanoj baptitaj ricevis malgrandan pliigon: 19.822 unuojn. Kiel do oni povas klarigi la malgrandan totalan pliigon? Verŝajne la respondo kaŝiĝas en problemo, kiu ne apartenas nur al Koreo: la multenombra forlaso el la kamparaj regionoj kaj vilaĝoj cele al la grandaj urboj, kie multaj "perdiĝas" en la nova medio. Tio, kio precipe kreas zorgojn, estas la alta nombro de la altiritaj junuloj. Oni klopodis aranĝi kel-

kajn rimedojn, sed evidente, oni devas ankoraŭ pli efi ke ripari. En aliaj sekcioj oni rimarkis grandan kreskon kompare al la antaŭa jaro. Oni kreis 22 novajn parokojn. La nombro de la sacerdotoj (diocezaj kaj reliĝiuloj), kiuj estas nun 883, kreskis je 48 unuoj kompare al la antaŭa jaro. El tiuj 883 sacerdotoj, 520 estas koreanoj. La nombro de la fratoj (112) iomete malpliiĝis, kiel same tiu de reliĝiulinoj (nun 2150). Kvankam laŭ diversaj aspektoj oni povas rigardi Koreon kiel misian regionon, tamen oni devas agnoski, ke la 75 procento de reliĝiuloj kaj la 90 p.c. de reliĝiulinoj estas koreanoj. Alia pozitiva rimarko estas la pliigo de pliaĝaj seminarianoj, kiuj nun estas 602.

KARDINALO JOZEFO KLEMENTO MAURER, ĉefepiskopo de Sucre - Bolivio - adresis mesaĝon al episkopoj, klerikaro, gereliĝiuloj, deklarante ke, laŭ la ĉarto de Medellin, la eklezio devas disdoni siajn riĉaĵojn favore al malriĉuloj. Li vekis akrajn reagojn el la konservativaj medioj, sed alvenis ankaŭ multaj aproboj. Aparte tuta reliĝio respondis malavare al la invito de la kardinalo: la Oblatoj, kiuj tuj decidis rezigni pri ĉiuj siaj propraĵoj favore al la bolivia registaro, por la kreo de novaj lernejoj, hospitaloj aŭ industrioj. La valoro de la donitaĵoj estas proksimume 65 milionoj da liroj. P. Gregoro Iriarte, ĝeneralo de la Oblatoj, decidante kun ĉiuj siaj ordenanoj tiun donacon, deklaris: Ni ĵetis semon, kiu ebligos certe pli profundan aliiĝon de lando, laŭ la evangelio de Kristo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONO: £. 1.000 (Us.dol.1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari
(aŭ) pĝk. 1-37638 al: P.Giacinto Jacobitti

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo